

---

---

La sonorilo de Bled  
Blejski zvon

---

STEVAN ŽIVANOVIĆ

V slovenščino prevedel  
Milan Jarnovič

---

MARIBURGO  
2017  
MARIBOR

---

---

CIP – kataložni zapis o publikaciji  
Univerzitetna knjižnica Maribor

821.163.6-31 ŽIVANOVIĆ, Stevan, 1900-1938

La sonorilo de Bled = Blejski zvon / Stevan Živanović;  
[prevedel Milan Jarnovič] - Maribor: Esperantsko društvo, 2016  
ISBN 978-961-285-308-2 | COBISS.SI-ID 87363073

*Mi dankas al sinjoro Vinko Ošlak pro lia granda kontribuo kiu faris detalan kontrolon kaj lingvajn korektojn.*

*Zahvaljujem se gospodu Vinku Ošlaku za njegov velik prispevek pri nastanku tega prevoda, ki ga brez njega ne bi bilo.*

Milan Jarnovič

Stevan Živanović (1900 - 1938) estis tre konata kaj tre diligenta esperantisto inter la du mondmilitoj en tiama Jugoslavio. Profesie li estis kuracisto. La romano *Sonorilo de Bled* estis verkita ĉirkaŭ la jaro 1925 en Esperanto kaj estis publikigita kiel literatura heredaĵo post lia morto en la jaro 1959. Ĝi estis la nura romano skribita en Esperanto, kiu okazas en Slovenio.

En la epoko de la romano, Bled estis ripozloko de la Reĝlando de Jugoslavio kaj kune kun Bohinj ofte la restadejo de membroj de la Jugoslavia Reĝa Dinastio.

Stevan Živanović (1900 – 1938) je bil zelo znan in zelo prizadeven esperantist v Kraljevini Jugoslaviji, sicer po poklicu zdravnik. Roman *Blejski zvon* je nastal okoli leta 1925 v esperantu in bil iz njegove literarne zapuščine objavljen šele leta 1959. Je edini roman napisan v esperantu, ki se dogaja v Sloveniji.

Bled je bil v času nastanka romana mondeno letovišče Kraljevine Jugoslavije in skupaj z Bohinjem tudi pogosto bivališče članov jugoslovanske kraljevske dinastije.



## La unua parto

## Prvi del

### I

Vagonaro rapidis preskaŭ vete tra ĉarmaj regionoj de bela Slovenio. Malantaŭ ĝi veturis sur polvoplana ŝoseo ĉarma aŭtomobilo. Post kelkaj momentoj, estinte pli rapida, la aŭtomobilo atingis nigran monstron, kiu el sia fumotubo elĵetas nubojn da fumo kaj siblas kiel serpentego.

Atinginte la vagonaron, vojaĝantoj de la aŭtomobilo vidis kelkajn homojn, kiuj el la vagonaro per siaj poŝtukoj ŝvingis la kutiman saluton. Sed ĝi daŭris nur kelke da momentoj, ĉar la aŭtomobilo, pro kurbiĝo de la ŝoseo, baldaŭ ne estis videbla por fervojojaĝantoj.

Duonhoron post renkonto de du interkomunikiloj la aŭtomobilo haltis ĉe la supraĵo sur kiu estas hotelo *Mondo*. Uniformita servisto elprenis la pakajojn de la alvenintoj. Polvigitaĵ de kapo ĝis piedoj, la alvoja ĝintoj provis forigi polvon de sur siaj vestoj, sed la sukceso estis preskaŭ nenia. Kvazaŭ hontemaj pro la stranga aspekto, ili rapide surprénis la ŝtuparon kondukantan al la unua etaĝo.

Ekstere regis julia varmego, malagrabla pro siaj tiel nomataj *hundaj tago*. La suno jam trairis la duan trionon de sia ŝajna enĉiela vojaĝo.

Vlak je skoraj kakor za stavo hotel po oĉarljivih predelih lepe Slovenije. Za njim je vozil po praŝni cesti ĉeden avto. Ĉez nekaj trenutkov, bil je hitrejŝi, je avto dohitel ĉrno poŝast, ki je iz svoje izpuŝne cevi bruhala oblake dima in sikala kakor velikanska kaĉa.

Ko so dohiteli vlak, so potniki v avtomobilu videli nekaj ljudi, ki so jim iz vlaka po obiĉaju mahali z robci v pozdrav. Toda to je trajalo le nekaj trenutkov, saj avtomobila zaradi ovinka z vlaka ni bilo mogoĉe veĉ videti.

Pol ure po sreĉanju obeh transportnih sredstev se je avtomobil ustavil na planoti, kjer je hotel *Svet*. Uniformiran streŝnik je odnesel prtljago prispelih. Potniki so bili prekriti s prahom od glave do pet, poskuŝali so se oĉistiti, vendar brez kakrŝnegakoli uspeha. Kakor da bi se sramovali ĉudnega videza, so hitro odŝli po stopnicah v prvo nadstropje.

Zunaj je vladala julijska vroĉina, neprijetna zaradi tako imenovanih *pasjnih dni*. Sonce je ŝe preŝlo dve tretjini svoje navidezne dnevne poti

“Estas tro varme, miaj sinjoroj. Tamen mi estas feliĉulo, ĉar se mi estus dika, trioble pli malfacile mi tolerus ĉi tiun sufokan aeron. Aĉe estas vivi dum somero. La suno brilas kvazaŭ ĝi intencus rosti mian kapon. Mi kredas, ke la tuta mondo tamen ne suferas pro varmega. Diru, sinjoro Miroir, ĉu en Suda Francujo la suno same tiel brilegas?”

Ĉi lastajn vortojn elparolis sufiĉe alta homo, aĝa ĉirkaŭ kvardek jaroj, kun malgrandaj, vivecaj okuloj, kun bruna, mallonga barbo. Li estas inĝeniero Memo.

Turninte sin al la parolinto, Miroir ridis pri tio ke al Memo estas varmege post tiom rapida aŭtomobilveturado. Li konfirmis al li, ke Sudan Francujon premas la sama varmege, se eĉ ne pli alta temperaturo regas lian naskourbon Marseille. Respondinte al la inĝeniero, li turnis sin al apud li staranta kunvojaĝinto:

“Sinjoro Duulo, laŭ aspekto de tiu ĉi regiono inter la montoj, ŝajnas ke tie ĉi estas belege. La ĉirkaŭaĵo al mi tre multe plaĉas. Certe al vi ne mankos amuzaĵoj, vi povos pentri tiun ĉi regionon, kaj ĝiaj naturvidindaĵoj liveros al vi belegajn pejzaĝojn.”

“Efektive, tie ĉi estas agrable,” respondis la pentristo. “Espereble

po nebu.

“Preveĉ je vroĉe, gospodje moji. Vendar imam sreĉo, ĉe bi bil debel, bi takrat trikrat teĝje prenaŝal ta zaduŝljivi zrak. Pasje je živeti poleti. Sonce sije, kakor da bi mi hotelo spraziiti glavo. Verjamem, da ves svet vendar ne trpi take vroĉine. Povejte mi, gospod Miroir, ali v juĝni Franciji sonce enako pripeka?”

Te besede je izgovoril precej visok ĉlovek, star pribliĝno ŝtirideset let, z majhnimi, živahnimi oĉmi in rjavo, kratko brado. To je inĝenir Memo.

Ko se je obrnil h govorniku, se je Miroir smejal temu, da je Memu vroĉe po tako hitri voĝnji v avtomobilu. Potrdil je, da juĝno Francijo tlaĉi enaka vroĉina, v njegovem rojstnem mestu Marseillu je celo ŝe bolj vroĉe. Ko je odgovoril inĝenirju, se je obrnil k sopotniku, ki je stal poleg njega.

“Gospod Duulo, kakor je videti tale pokrajina med gorami, se zdi, da je tu prekrasno. Okolica mi je zelo vŝeĉ. Gotovo vam ne bo manjkalo zabave, lahko boste slikali to pokrajino, in njene naravne znamenitosti vam bodo dajale ĉudovite prizore.”

“Dejansko, tu je prijetno,” je odgovoril slikar. “Upam, da boste za-

vi eksentos ke ĉi tieaj naturbelecoj homon povas eĉ feliĉigi. Per la rigardado de naturaj belecoj oni povas forigi ĉiujn premantajn pensojn, refreŝigi sian cerbon kaj forgesi la pasintaĵojn. Tie ĉi, miaopinie, estas ĝusta loko por anima ripozo, kiun mi ankaŭ nepre bezonas. Vi verŝajne longe memoros pri Bled, tion mi antaŭsentas. Ne demandu kiel, sed ofte mi povas deĉifri ion kio okazos en la estonteco.”

Miroir ekridetis pro la dirita strangaĵo. Li ne volis plu paroli, dum liaj kunvojaĝintoj ankaŭ eksilentis kaj rigardis diversajn objektojn en la akceptejo, simple meblita, kiel en ĉiuj hoteloj por la gastoj ne ŝatantaj lukson. Ĝi estis pura ejo kaj, juĝante laŭ ĝia aspekto, oni povus konjekti ke la hotelo estos agrabla restadeĵo.

“Miaj sinjoroj,” ekparolis la inĝeniero, kies voĉo estis forta, pro kio ŝajnis ke li volas paroli al la publiko, “pli rapide ni alvenis ol rapidvagonaro, kvankarn ni ekveturis kvar horojn post ĝi. Kion vi opinias pri mia aŭtomobilo?”

“Ĝi estas belega aĵo. Oni vidas ke vi komprenas vian fakon,” respondis pentristo Duulo.

“Ĉiun ŝraŭbon de la motoro mi mem faris. La tuta afero daŭris tri jarojn. Mi ŝanĝis preskaŭ ĉiumonate kelkajn gravajn partojn

ĉutili, da tukajŝnje naravne lepote lahko ĉloveka celo osreĉijo. Pri glandanju teh lepot lahko odĝenete vse teĝke misli, osveĝite svoje moĝgane in pozabite na dogodke iz preteklosti. Tukaj je, po mojem mnenju, pravi kraj za duhovni poĉitek, ki ga tudi nujno potrebujem. Obĉutek imam, da boste Bled ŝe dolgo pomnili. Ne spraŝujte kako, toda pogosto lahko razberem kaj takega, kar se bo zgodilo v prihodnosti.”

Miroir se je nasmehnil ĉudni napovedi. Ni hotel veĉ govoriti, ko so tudi njegovi sopotniki umolknili in si ogledovali razne predmete v preprosto opremljeni recepciji, kakŝne so v vseh hotelih za goste, ki ne cenijo razkoŝja. Bil je ĉist prostor, ĉe bi sodili po videzu, bi lahko sklepali, da bo hotel prijetno bivalivsĉe.

“Gospodje moji,” je spregovoril inĝenir, ĉigar glas je bil moĉan, zaradi ĉesar se je zdelo, kakor da hoĉe govoriti javnosti, “hitreje smo priŝli kakor hitri vlak, ĉeprav smo odŝli ŝtiri ure pozneje kakor ta. Kaj menite o mojem avtu?”

“Prelepa stvar je. Vidi se, da se razumete na svojo stroko,” je odgovoril slikar Duulo.

“Vsak vijak motorja sem naredil sam. Vsa zadeva je trajala tri leta. Skoraj vsak mesec sem zamenjal nekaj pomembnih delov mo-

de la motoro kaj enmetis pli novajn kaj perfektajn. Kompreneble, mi mem ĉion perfektigis kaj fine la rezulto estas tre bona. Cent kilometrajn po horo ni veturis. La rapideco de ducent kilometroj estus ankaŭ atingebla, se la ŝoseoj ne estus plenaj da truoj kaj se mi kuraĝus riski la vivon. Nu, mia Miroir, ĉu vi aŭdis pri io simila en Francujo?”

“Kredu al mi, dum la legado de viaj leteroj mi ĝis antaŭnelonge ridis pri via fantazio. Nun mi bedaŭras mian ridon, konvinkita ke via akumulatoro ŝajnas efektivebla afero.”

Iom ofendita pro dubemo de Miroir, Memo respondis:

“Ĝi jam ekzistas, per ĝi vi veturis, nekredemulo. Kion fari, la virinoj estas pli interesaj objektoj por vi ol mia akumulatoro. Bedaŭrinde, ankaŭ ĉe ni multaj junaj homoj dediĉas tro multe da tempo al senvaloraj amuzajoj, anstataŭ al pli utilaj aferoj,” li moke aldonis.

“Nu, vi pravas. Tamen, ne ĉiuj homoj povas esti tiaj kiel vi, ĉar malgraŭ via aĝo vi ankoraŭ ne edziĝis. Certe vi ne havis tempon por pensi pri tio,” respondis Miroir.

“Ha, sinjoro inĝeniero iagrade eĉ malŝatas la virinojn! Li certe havas gravan kaŭzon por tio, nur ni estus sendiskretaj, se ni detale priparolus la aferon,” aldonis Duulo.

torja in vstabil nove, izboljšane. Razumljivo sem vse skupaj še izpopolnil sam in konĉni rezultat je zelo dober. Sto kilometrov na uro smo se peljali. Dosegljiva bi bila tudi histrost dvesto kilometrov na uro, ĉe ceste ne bi bile polne lukenj in ĉe bi si drznil tvegati živiljenje. No, moj Miroir, ste slišali kaj podobnega v Franciji?”

“Verjemite mi, da sem se pred kratkim, ob branju vašega pisma, dolgo smejal vaŝi domiŝljiji. Zdaĵ obŝalujem svoj posmeh, prepriĉan, da je vaŝ akumulator uĉinkovita zadeva.”

Malo uŝaljen zaradi Miroirjevega dvoma je Memo odvrnil:

“Ta ŝe obstaja, z njim ste se peljali, nejeverneŝ. Kaj hoĉemo, ŝenske so za vas bolj zanimiv predmet kakor moj akumulator. Ŝal tudi pri nas veliko mladih posveĉa preveĉ ĉasa niĉvredni zabavi, namesto uporabnim stvarem,” je posmehljivo dodal.

“No, imate prav. Vendar pa ne morejo biti vsi ljudje kakor vi, ko pri svojih letih ŝe vedno niste poroĉeni. Gotovo niste imeli ĉasa premiŝljati o tem,” je odvrnil Miroir.

“Gospod inŝenir nekako celo ne mara ŝensk! Gotovo ima za to pomemben razlog, a bili bi nediskretni, ĉe bi se o tem podrobnio pogarjali,” je dodal Duulo.



“Babilu kion vi volas, min pli interesas mehaniko kaj, se la virinoj estus tiom interesaj, eble mi okupus min ankaŭ pri ili,” respondis Memo kolereme.

“Kiajn vortojn vi uzas: Tamen vi povus rakonti almenaŭ nun pri io pli aktuala ol estas mehaniko,” moke riproĉetis Duulo.

Inĝeniero ekridetis kaj oni vidis ke lia rideto estis nur ŝajna esprimo de gajeco, ĉar li efektive ekkoleris.

lom poste Miroir demandis Duulon pri horo de alveno de la societo, pri kiu ili parolis dum veturado.

“Vi ĝin post mallonga tempo vidis kaj certe ne bedaŭros tion. Al ĝi apartenas kelkaj belaj fraŭlinoj kaj unu belega, aŭ pli bone, eĉ ĉarmega sinjorino. Ĉu vere, sinjoro Memo?”

Akcentante ĉi suprajn vortojn pri la sinjorino, la pentristo denove kolerigis inĝenieron. Tiu ĉi ekmordis sian malsupran lipon pro kolerokaj ruĝiĝis. Tamen li rapide trankviliĝis kaj per afabla voĉo rekomendis al la pentristo zorgi pri siaj propraj aferoj. Al li estis malagrabla tia konduto de Duulo, tial ke liajn vortojn aŭdis Miroir, kiu eksciis kelkajn intimaĵojn pri siaj konatuloj.

Estas vero, la pentristo antaŭe ofte mokis al Memo pro sinjorino en intima rondo, kaj li ne koleris. Nun, ĉar ĉeestas Miroir, por ili ankoraŭ fremda persono, tiu ĉi mokado lin

“Ĉvekajte kar hoĉete, bolj me zantina mehanika in ĉe bi bile ženske tako zanimive, bi se morda ukvarjal tudi z njimi,” je jezno odgavoril Memo.

“Kakšne besede uporabljate. Lahko pa bi vendar vsaj zdaj povedali kaj bolj aktualnega, kakor je mehanika,” je posmehljivo oĉital Duulo.

Inženir se je nasmehnil, vendar se je videlo, da je nasmešek narejeno vesel, ker je bil v resnici jezen.

Nekaj kasneje je Miroir vprašal Duula ob kateri uri prispe družba, o kateri so se pogovarjali med voŝnjo.

“V kratkem jih boste videli in tega gotovo ne boste obžalovali. Med njimi je nekaj lepih deklet in zelo lepa, ali ŝe bolje, zelo oĉarljiva goŝpa. Ali ne, goŝpod Memo?”

S poudarjanjem besed o tisti goŝpe je slikar spet razjezil inženirja. Ta se je jezno ugriznil v spodnjo ustnico in zardel. Vendar se je hitro pomiril in s prijaznim glasom priporoĉil slikarju, naj se briga za svoje reĉi. Neprijetno mu je bilo tako Duulovo vedenje, ker je njegove besede slišal Miroir, ki je tako izvedel nekaj skrivnosti svojih znancev.

Prej ni bil nikoli jezen, ĉeprav je slikar med znanci pogosto zbadal Mema z damo. Zdaj, ker je bil zraven Miroir, zanje ŝe tujec, ga je tak ŝno norĉevanje jezilo, zato je

kolerigis, kaj li trovis necesa klarigi la aferon, por ke Miroir ne estu pri ĝi malbone informita. Li akcentis, ke li ĝis nun preferis amuziĝi kun la sinjorino, kies nomo estas Julinjo, ĉar en la societo estas plejparte gejunuloj, pro kio li, estante pli aĝa homo, amuzas la sinjorinon. “Ŝi povas kelkafoje paroli pri seriozaj aferoj, kvankam la serioza parolado kun virinoj estas tre malfacila afero,” li finis sian frazon.

Miroir tute ne aŭskultis lian klarigon, ĉar al li ŝajnis superflua ĉi tiu diskuteto, kiu lin tute ne rilatas. Krome, estis por li malagrabla kiel al gasto tuj komence interesiĝi pri la intimaĵoj de siaj konatuloj.

Respondante al la klarigo de Memo, Duulo pardonigis, akcentinte, ke li ne voliŝ lin ofendi. Li volis klarigi ankoraŭ ion koncerne ĉi tiun aferon, sed ĵus alvenis direktoro de la hotelo, pro kio li devis eksilenti. Tiu ĉi salutis la gastojn per profunda kapklino. Pro sia korpulenteo al la gastoj li ŝajnis kiel grasa amaso, ŝovanta sian ventron antaŭ si. Pro lia ridinda staturo Miroir laŭte ekridis elkore kaj ĉiuj konsterniĝis pro tiel subita ridado, ne sciante ĝian kaŭzon. La direktoro lin rigardis strange, kredante ke la gasto ne estas tute normala homo kaj Miroir pro tiu stranga rigardo post tre mallonga tempo serioziĝis. La direktoro prenis de sur la ta-

imel za potrebnou, da pojasni zadevo Miroirju, da o njej ne bi bil napak obveŝĉen. Poudaril je, da je dotlej, rajje zabaval gospo, ki ji je ime Julka, saj so v družbi veĉinomla mladi, zaradi ĉesar je on kot starejši, zabaval gospo. “Ona lahko vĉasih govori o resnih stvareh, ĉeprav je resen pogovor z ženskami zelo teŝka stvar,” je konĉal svoj stavek.

Miroir sploh ni posluŝal njegove razlage, ta malenkostna diskusija se mu je zdela nepotrebna, saj ga niĉ ne zadeva. Povrh vsega mu je bilo neprijetno, da bi se kot gost takoj na zaĉetku zaĉel zanimati za zaupne zadeve svojih znancev.

Ko je odgovoril na Memovo razlago, se je Duulo opraviĉil in poudaril, da ga ni hotel uŝaliti. Hotel je pojasniti ŝe nekaj v zvezi s tem, vendar je prav tedaj priŝel direktor hotela, zaradi ĉesar je moral umolkniti. Ta je goste pozdravil z globokim priklonom. Zaradi svoje korpulentnosti se je zdel gostom podoban kupu maŝĉobe, ki pred sabo potiska svoj trebuh. Zaradi njegove smeŝne postave se je Miroir glasno zasmeljal in vse osupil z nenadnim smehom, za katerega niso vedeli razloga. Direktor ga ĉudno pogledal, misleĉ, da gost ni ĉisto normalen ĉlovek, in Minoir se je po tem ĉudnem pogledu ĉez malo ĉasa zresnil. Direktor je z mize vzel de-

blo dikan libron, trovis la numerojn de lueblaj ĉambroj kaj ordonis al ĉambristino gvidi la gastojn. Ĉiujn demandojn li respondis per agrabla, preskaŭ humila voĉo, kvazaŭ hundo deziranta ricevi bongustan oston, sed la ordono al la ĉambristino pruvigis, ke li scias eĉ ordonadi kaj severe agi kontraŭ siaj subuloj.

Lacaj pro vojaĝo la gastoj pene ekiris al siaj ĉambroj.

belo knjigo, naŝel ŝtevilke prostih sob in ukazal sobarici, naj povede goste. Na vsa vpraŝanja je odgovoril s prijetnim, skoraj poniŝnim glasom, podloŝniŝko kakor pes, ki ŝeli dobiti okusno kost, toda ukaz sobarici je pokazal, da celo zna ukazovati in biti strog do svojih podrejenih.

Gostje, utrujeni zaradi potovanja, so s teŝavo odŝli v svoje sobe.

## II

Anoncante la naskiĝon de nova tago, la suno leviĝis. Tra malfermita fenestro en ĉambron de sinjoro Miroir enpenetris freŝa matena aero. Li dormis. La suno baldaŭ leviĝis pli alten kaj per siaj radioj lumigis la tutan ĉambron, pro kio Miroir, malfermante la okulojn, gaje ekridetis. Tiu ĉi rideto ŝajnis la rideto de homo refreŝiĝinta dum sonĝo. Miroir multe sonĝis ĉi nokte. Oni eĉ povus diri, ke liaj diversaj sonĝoj estiĝadis unuj post la aliaj per fulma rapideco, pro kio ili ne estis klare percepteblaj por lia cerbo. De tiuj sonĝoj li provis rekonstrui tiun, kiu en lia memoro ŝajnis la plej bela. Vane. Ne estis eble revenigi la sonĝon pri iu ĉarma personeco, jam delonge serĉata kaj foje en sonĝo vidita, sed neniam aperinta en la realeco. Ĝi aperis kelkafoje en lia fantazio eĉ tage, sed malgraŭ granda imagopovo lia

Vzŝlo je sonce in napovedalo rojstvo novega dne. Skozi odprto okno je v sobo gospoda Miroira vdiral sveŝ jutranji zrak. Spal je. Sonce se je kmalu dvignilo in s svojimi ŝarki osvetlilo vso sobo, zaradi ĉesar se je Miroir zbudil in se radostno nasmehnil. Ta nasmeh se je zdel kakor nasmeh moŝkega, ki so ga osveŝile sanje. To noĉ je Miroir veliko sanjal. Lahko bi se reklo, da so se sanje bliskovito vrstile druga za drugo, zato jih v svojih moŝganih ni mogel dobro dojeti. Izmed teh sanj je poskuŝal obuditi tiste, ki so se mu po spominu zdele najlepŝe. Zaman. Ni bilo mogoĉe obuditi sanje o neki oĉarljivi osebi, ki jo ŝe dolgo iŝĉe, vĉasih vidi v sanjah, vendar se v resniĉnosti nikoli ne pojavi. V njegovi domiŝljiji se vĉasih pojavi celo podnevi, vendar si kljub bogati imaginacii njegovi moŝgani zaman prizadevajo, da bi si priklical njeno

cerbo nun vane penis ĝin reaperigi.

“Hm, ĝuste ŝi, vane serĉata en la vivo. Efektive, kia ŝi estas?”

Per sia riĉa, poeta, fantazio, li denove provis el pensoj riveli la virinon, kies apero en la sonĝo ne estis klara. Eble li tamen sukcesus se lian cerbon ne regus stranga pezo, kiu ŝin el memorĉelo elpremadis kaj li ne povis memori pri ŝi. Apenaŭ liaj pensoj koncentriĝis ĉe la imaga estaĵo, tuj ilin anstataŭis novaj ekpensoj pri diversaj dumvojaj okazintaĵoj. Kiom ajn li deziris forgesi ĉiujn survojajn impresojn, kiom ajn li penis mediti nur pri sia imaga virino, li ne povis riveli la bildon en la cerbo, ĉar survojaj impresoj estis pli fortaj. Tial Miroir eĉ malvolonte devis cedi al la estonteco ke ĝi deĉifru ĉi tiun enigmon. Kolere li marŝis tra la ĉambro, riproĉante al si, ke li ne povas koncentri siajn pensojn. Li preskaŭ estis preta kredi ke la poeta donaco de imagebleco ne plu bone servas al li. Li riproĉis sian decidon veni ĉi tien, kie la naturo perforte devigas lin nur adori ĝian belecon kaj en lia cerbo respeguligas sian admirindan aspekton forprenante la aliajn pensojn. Momente estis al li malklara eĉ la celo de la vojaĝo. Ĉu li en Marseille efektive eksentis strangan deziron edziĝi en Jugoslavio? Kial? Ĉu tial ke unika lia korespondanto estis lastatempe jugoslavo? Aŭ, eble li estis konvinkita

podobo.

“Hm, prav ona, ki jo zaman išĉem v življenju. Kakŝna je v resnici?”

S svojo bogato, poetiĉno fantazio je v mislih spet poskušal priklacati nejasno podobo ženske iz sanj. Morda bi mu celo uspelo, ĉe njegovega spomina ne bi obvladovala ĉudna teĝa, ki jo je iztiskala iz spominske celice, da se je ni mogel spomniti. Komaj se njegove misli osredinijo na izmiŝljeno bitje, jih takoj zamenjajo novi spomini razliĉnih dogodkov med potjo. Kolikor koli je ŝeĝel pozabiti vse popotne vtise, kolikor koli si je prizadeval premiŝljati le o svoji namiŝljene ženski, ni mogel izvleĉi slike iz moĝgan, ker so bili vtisi s poti moĉnejŝi. Zato je Miroir, ĉeprav nerad, moral prepuŝtiti prihodnosti, da razreŝi to uganko. Jezno je stopal po sobi, oĉitaĵoĉ si, da ne more zbrati svojih misli. Bil je skoraj pripravlen verjeti, da mu pesniŝki dar imaginnacije ne sluĝi veĉ. Oĉital si je svojo odloĉitev, da pride sem, kjer ga narava sili oboĝevati samo njeno lepoto in bo v njegovih moĝganih to obĉudovanje odneslo druge misli. Trenutno mu je bil nejasen celo cilj potovanja. Je v Marseillu res zaĉutil ĉudno ŝeljo, da se poroĉi v Jugoslaviji? Zakaĵ? Ali zato, ker je bil njegov edini dopisovalec v zandnem ĉasu Jugoslovan? Ali ker je bil prepriĉan o lepoti tukajŝnjih žensk? “Spomnim se, da sem vi-

pri beleco de ĉi tieaj virinoj? “Ho jes, mi memoras, ke mi vidis dum la terura mondmilito multe da jugoslavaj virinoj. Ili estis pro funebro pliparte nigre vestitaj, sed tamen plaĉindaj. Kiom da fojoj mi aŭdis pri ilia fabela fideleco. La francaj virinoj tre ofte al mi ŝajnis artaj pupoj kreantaj nur por materiala ĝuo. Kaj nun, ĉu post tiaj konvinkoj mi povus entute imagi mia edzino iun francinon? Ne, centfoje ne. Mi do efektive venis pro mia edziĝo. Sed ne estis nur ĝi la kaŭzo de mia vojaĝo,” daŭrigis Miroir paroli al si mem. “Mi, konata franca verkisto, intencas surprizi francan publikon per unu bona romano. Multe mi ne envias mian nun jam mortan konkuranton Pierre Loti, pro liaj longaj vojaĝoj, sed mi tamen decidis vojaĝi por ke mi travivu unu novan okazintaĵon por mia romano.”

Miroir ne meditis, ke Pierre Loti komprenis la susuron de herboj kaj mildan ondokantadon de la maroj sur kiuj li vojaĝis, ke li sentis la batojn de virinaj koroj, ke li sincere ploretis pro doloroj de orientaj virinoj ĉar li ilin eksentis. Miroir imagis la tutan aferon alia ol ĝi estas. Li kredis, ke la vojaĝo per si mem pliriĉigos lian fantazion, kaj ke li travivos ion eksterordinaran.

Superflue al li ŝajnis ke en krudaj travivaĵoj li eksentu almenaŭ parte la pulsadon de la vivo, kiu kreas

del med straŝno svetovno vojno veliko jugoslavanskih žensk. Bile so zaradi žalovanja veĉinoma obleĉene v ĉrno, ampak vseeno prijetne na pogled. Kolikokrat sem slišal o njihovi pravljichni zvestobi. Francoske ženske se mi zelo pogosto zdijo izumetniĉene punĉke, ustvarjene samo za materialno uĝivanje. In zdaj, ali si lahko po takem prepriĉanju sploh predstavljam Francozinjo za ŝeno? Ne, stokrat ne. Torej sem dejansko priŝel, da bi se poroĉil. Vendar ni bilo samo to razlog mojega potovanja,” je nadaljeval Miroir pogovor sam s seboj. “Jaz, znan francoski pisatelj, hoĉem presenetiti francosko obĉinstvo z dobrim romanom. Svojemu ŝe mrtvemu konkurentu Pierru Lotiju ne zavidam kaj dosti njegovih dolgih potovanj, vendar sem se odloĉil za potovanje, da bi doĝivel kako novo dogodivŝĉino za svoj roman.”

Miroir ni premiŝljaj, da bi Pierre Loti razumel ŝumenje trav in blago pesem valov morij, po katerih je potoval, ali da bi ĉutil utripe ženskih src, ali da bi iskreno zaĉutil in objokoval boleĉine vzhodnih žensk, ker jih je zaĉutil. Miroir si je vso stvar predstavljajal drugaĉno, kakor je bila. Verjel je, da bo njegovo potovanje obogatelilo njegovo domiŝljijo in da bo doĝivel kaj izrednega.

Odveĉ se mu je zdelo, naj po hudih doĝivetjih vsaj deloma zaĉuti utrip življenja, ki ĉesto ustvarja bolj ne-

ofte pli nekredeblajn okazintaĵojn, ol ilin povas krei verkista fantazio.

Nun, meditante pri la virinoj en Francujo kaj komparante ilin kun tiuj en Jugoslavio, li imagis, ke ĉe la lastaj la fideleco estas firma eco ĝermanta en la koroj de la virinoj, eĉ ne pensante pri la alia ebleco ke la fideleco estas ege relativa afero. Vere ĝi ĝermas en la koro de virinoj; ĝi estas al ili de la naturo donacita en pli alta grado ol al la viroj sed ĝi similas al birdeto en la kaĝo; se oni malfermas la pordeton ĝi ofte forflugas, kaj pri forflugintaj birdoj oni malofte aŭdas ke ili revenas. Kaj tiun pordeton la viroj ofte malfermas, pliparte pro sia stranga nekomprenejo, se ni ne volas mencii la ceterajn psikajn kaj aliajn kaŭzojn.

Stimulita de sonorado de malgranda sonorilo, Miroir eksentis delikatecon en sia interno. Tra frumatenoj la sonoj de sonorilo sorĉe vagadis. Kiel kanto jen disvastiĝadis mildaj sonoj portataj de etertremeto, jen malaperadis. La sonorilo ŝajnis admonanta la homojn per sia sonorado, pro kiu en silento ehas la tuta ĉirkaŭaĵo.

Miroir ne sciis kial oni sonorigas tiel ofte. Li aŭdis la sonoradon, kaj ĝi ŝajnis al li muziko kantata de ĥoro de anĝeloj, portantaj la amon, pasian amon, donante ankaŭ al li erton da ĝi. Ĉe la fenestro li subite ekflustris la versojn de jena poemo:

verjetne dogodke, kakor bi jih lahko ustvarila pisateljska domišljija.

Sedaj, ko premiŝlja o ženskah v Franciji in ko jih primerja s temi v Jugoslaviji, si je predstavljaj, da je pri njih zvestoba trdna lastnost, ki klije v srcih teh žensk, ne da bi samo pomislil na ŝojnost, da je zvestoba zelo relativna reĉ. Res je, da klije v srcih žensk; dana jim je po naravi, v veĉji meri kakor moŝkim, vendar je podobna ptiĉki v kletki; ĉe se odpro vratca, pogosto odleti, in le redko se sliŝi, da bi se odletela ptiĉka vrnila. Ta vratca moŝki pogosto odprejo, najveĉkrat zaradi ĉudnega nerazumevanja, ĉe naj ne omenjamo sicerŝnjih psiĉiknih ali drugih vzrokov.

Spodbujen z oglašanjem zvonĉka je Miroir v sebi zaĉutit neĝna ĉustva. V zgodnjem jutru je zvonjenje ĉarobno priplavalo do njega. Kakor pesem so se razlegali neĝni zvoki, noŝeni po tresoĉem se etru, ki so se zdaj zdaj spet izgubljal. Zdelo se je, da zvonĉek s svojim zvenom opominja ljudi, zaradi ĉesar v tiŝini odmeva po vsej okolici.

Miroir ni vedel, zakaj ljudje zvonijo tako pogosto. Sliŝal je zvonjenje, zdelo se mu je kakor pesem, ki jo poje zbor angelov, ki nosi lju-bezen, strastno lju-bezen, in ta mu daje delĉek tega. Ob oknu je nenadoma zaŝepetal verze tiste pesmi:

*“Paradizon teran vidis  
Mi en lando nekonata  
Venu al mi, tien iri  
Kune devas ni amata  
Tie, kara, ni aŭskultos  
Sonorilan kanton belan  
Kaj en korpoj sentos amon  
Fortan, fajran, kaj misteran.”*

Pro supraj versoj li entuziasmiĝis. La poemo al li tiom plaĉis, ke li pro ĝojo saltetis en la ĉambro.

“Kie mi aŭdis la poemon tiom klare esprimantan la sentojn de mia animo?”

Li ne kredis, ke li ĝin nun mem verkis, kvankam tiel estis. Longtempe li observis la ĉirkaŭaĵon kaj avido enspiradis freŝan aeron. Iom poste li lavis sin kaj eksentis kvazaŭ liaj pensoj refreŝiĝus. Post viŝiĝo de siaj vizaĝo kaj manoj li ekvestis sin, sed malgraŭ tiu okupo li ne povis forigi la impreson, esti ĝintan en lia animo pro la poemo.

“La vivo estas bela kaj mi ne havas amatinon,” li eksopiris mallaŭte. “Hm, ĝi estas banala penso. Juna mi estas. Ankaŭ banala konstato. Mia korpo estas bela kaj tamen mi ne trovis ĝis hodiaŭ la kamaradinon por mi. En Francujo ĝi estis tute malebla afero.”

Denove Miroir koleris pro francaj virinoj, ne sciante, ke li, nuna revanto pri la fideleco, povus ankaŭ perfidi sian idealon kiel multaj aliaj

*“Raj zemeljski sem videl  
tam v deželi neznani.  
Pridi in pojdiva skupaj tja,  
tam, predraga, bova poslušala  
pesem lepo, zven zvona  
in v najinih telesih bova začutila  
ljubezen kakor ogenj in skrivnost.”*

Ob teh verzih ga je zajelo navduŝenje. Pesem mu je bila tako vŝeĉ, da je od radosti poskakoal v sobi.

“Kje sem slišal pesem, ki bi tako jasno izražala ĉustva moje duŝe?”

Ni verjel, da jo je spesnil sam, ĉeprav je bilo tako. Dolgo je opazoval okolico in hlastno vdihaval sveži zrak. Malo pozneje se je umil in ĉutil, kakor da bi ga njegove misli osveŝile. Potem, ko si je obrisal obraz in roke, se je oblekel, kljub tem vsakdanjim opravkom pa se ni mogel znebiti vtisa, ki je v njegovi duŝi nastal zaradi pesmi.

“Življenje je lepo, jaz pa sem brez ljubice,” je tiho zahrepenel. “Hm, banalna pomisel. Mlad sem. Tudi banalna ugotovitev. Moje telo je lepo, in vendar do danes nisem naŝel tovariŝice zase. V Franciji je bilo to popolnoma nemogoĉa zadeva.”

Znova se je Miroir jezil na francoske ŝenske, ne da bi vedel, da bi lahko, ko zdaj sanjari o zvestobi, izdal svoj ideal, kakor veliko drugih moŝkih,

viroj eĉ liaj amikoj. Li kredis sin pli nobla ol ili. Eble li tamen estis escepto inter aliaj siaj konatoj?

Eble Miroir daŭrigus mediti, se subita frapado sur la pordon ne ekĝenus lin. Eĉ li ekkoleris ke oni lin ekĝenis en la meditado, sed tamen li gajiĝis tuj kiam la inĝeniero eniris en la ĉambron.

“Post la matenmanĝo ni veturos al stacidomo. Je la deka horo alvenas la vagonaro kun la societo,” diris seke Memo.

“Al la stacidomo,” gaje rediris Miroir. “Ĝi estas belega afero, ĉar mi denove ĝuos en via aŭtomobilo. Hodiaŭ, mi esperas, vi ne veturos tiel rapide, ĉar la kapoj estas tro karaj kaj abismoj tre profundaj. Almenaŭ min mi ne dezirus surfunde vidi!”

Lia voĉo sonis gaje kaj Memo ridetis pro tia esprimo pri terura, okazebla danĝero. “Kiu scias,” li meditis, “ĉu mi iufoje rompos mian kolon, eble eĉ dum la momento kiam vivo fariĝos por mi pli bela.” Kaj dum la tuta veturado li memoris pri la vortoj de Miroir, pro kio la aŭtomobilo tre malrapide veturis. Oni vidis, ke ĝia posedanto ne plu havas la intencon pruvi kiam rapida ĝi povas esti. Sed, revenante al la hotelo la veturado ne estis plu tiom singarda. Eble pro tio, ke Memo malŝatis varmegon, pro kiu fariĝis aero sufoka kiam la brilanta suno tagmeze al-

celo njegovih prijateljev. Imel se je za bolj plemenitega od njih. Morda je vendar bil izjema med svojimi znanci.

Morda bi Miroir ŝe naprej premiŝlal, ĉe ga ne bi zmotilo nenadno trkanje na vrata. Celo razjezilo ga je, da so ga zmotili pri premiŝljanju, vendar se je razveselil, tekoj ko je inženir stopil v sobo.

“Po zajtrku se bomo odpeljali na postajo. Ob deseti pride vlak z družbo,” je suho dejal Memo.

“Na postajo,” je veselo odvrnil Miroir. “To je ĉudovita stvar, ker bom spet uŝival v vaŝem avtomobilu. Danes, upam, ne boste vozili tako hitro, saj so glave preveĉ dragocene in brezna zelo globoka. Vsaj sebe ne bi ŝelex videti na dnu.”

Njegov glas je zvenel veselo, in Memo se je nasmehnil zaradi take grozne moŝne nevarnosti. “Kdo ve,” je pomislil, “ali si bom nekoĉ zlomil vrat, morda celo v trenutku, ko bo postalo ŝivljenje zame lepŝe.” Med vsem potovanjem se je spominjal Miroirovih besed, zaradi ĉesar je avto vozil zelo poĉasi. Videli so, da njegov lastnik nima veĉ namena, da bi dokazal, kako hiter je lahko. A ko so se vraĉali v hotel, voŝnja ni bila veĉ tako prevedna. Morda zato, ker Memo ni maral vroĉine, zaradi katere je postal zrak zatohel, ko se je ŝgoĉe sonce opoldne pri-



proksimiĝis al zenito. Spite tion en la salono de la hotelo ĉiuj estis gaje disponitaj. La varmego ilin ne ĝenis; la junularo eĉ dancis.

Sufoka aero regis la salonon. Kvan-kam ekstere tiu sama sonorilo, pri kies sonorado dum frumateno meditis Miroir, sonoris tre forte, ĝiaj sonoj en la salono ne estis klare aŭdeblaj pro tre laŭta bruo. La junularo senlace dancis, entuziasmo ekregis ĝian animon. La paroj turniĝis, ŝovis unuj la aliajn kaj dancante moviĝis de unu flanko de la salono al la alia. Preskaŭ neniu el ili rimarkis kiel rapide oni povas la salonon multfoje trairi, eĉ ne eksentante laciĝon. Ĉiu vejneto en la korpo forte batis, la dancado ŝajne flustris pri la beleĉo de la vivo.

Tute neĝenataj de bruo kaj amuza dispono de la aliaj, en la angulo sidis kelkaj tre serioze parolantaj personoj. Ilin ne interesis la dancado. Jen, inter la aliaj in ĝeniero Petro Memo kun sinjorino Julinjo. Ili sidas unu apud la alia kaj dekstre de Memo staras pentristo Josefo Duulo.

Lia alta staturo estas bone rimarkebla inter la aliaj. Li havas seriozan, iom doloraspektan mienon. Lia vizaĝo estas longeta, kun bela, simetria nazo. Liaj bluaj okuloj serioze observas la gedancantojn, dum li aŭskultas la rakontadon de Memo pri la aŭtomobilo.

bliĝo zenitu. Kljub temu so bili v salonu hotela vsi veselo razpoloĝeni. Vročina jih ni motila, mladina je celo plesala.

V salonu je vladala soparica. Ĉeprav je zunaj tisti zvonček, o katera zvonĉkljanjuje dopoldne medital Miroir, zvonil zelo moĉno, njegovi zvoki zaradi glasnega hrupa v salonu niso bili slišni. Mladina je neutrudno plesala, navduŝenje je zajelo njihove duŝe. Pari so se vrteli, potiskali drug drugega in se v plesu premikali z ene strani salona na drugo. Skoraj nihĉe od njih ni opazil, kako hitro je mogoĉe salon veĉkrat prestopiti, ne da bi kdo zaĉutil utrujenosti. Vsaka ŝila v telesih je moĉno utripala, ples je kakor da ŝepetal o lepoti ŝivljenja.

V kotu je sedelo nekaj ljudi, ki so se zelo resno pogovarjali in jih ni motil hrup in zabava drugih. Ples jih ni zanimal. Med njimije bil inĝenir Peter Memo z gospo Julko. Sedela sta drug ob drugem, na Memovi desni je stal slikar Josef Duulo.

Njegova visoka postava je izstopala med drugimi. Ima resen, malo bolehen izraz. Njegov obraz je podolgovat z lepim simetriĉnim nosom. Njegove modre oĉi so resno opazovale plesalce, medtem ko je poslušal Memovo pripoved o avtu.

Memo trovis ankaŭ tie ĉi bonan okazon por laŭdado de sia veturilo. Per tia rakontado li ofte preskaŭ turmentis siajn geamikojn, tiel nun neniuj multe atentis pri ĝi.

Kelkfoje aperis sur frunto de la pentristo malgrandaj sulketoj, li por momento ĉesis rigardi la gedancantojn kaj direktis la okulojn al Memo. En ĉi tiuj okuloj ŝajne io flamis kaj la rigardo estis akra, pro kio Memo mallevis siajn okulojn.

Ŝajnas, ke nur la sinjorino atente aŭskultis la rakontadon. Ŝi kapjesis multfoje dum Memo parolis pri supozeblaj danĝeroj de la veturado, kvazaŭ ŝi volus montri intereson por tio. Ŝiaj nigraj haroj estas densaj, atenteme kombitaj kaj bele ordigitaj. Ŝi estas tridekjara, mezalta, ne estas dika, nek maldika. Sur supra parto de ŝia korpo oni tre bone rimarkas, proporcie al ŝia korpoalteco, sufiĉe altan bruston. Ŝiaj nigraj okuloj kelkfoje eĉ okulumas al Memo. Li verŝajne rimarkas ŝiajn signojn, ĉar la muskoloj de lia vizaĝo ekstremaĵe ĉe ĉiu rigardrenkonto, dum sur liaj lipoj aperas la rideto, kiun oni povus konsideri gaja. La atentema observanto rimarkus, ke li tamen ne estas indiferenta kontraŭ ĉiuj virinoj.

Kvankam sur la lipoj de sinjorino Julinjo, el kiuj la malsupra estas pli dika, ankaŭ montriĝas la rideto, ĝi

Memo je spet naŝel dobro priloznost, da hvali svoje vozilo. S to pripovedjo je pogosto muĉil svoje prijatelje, tako da se sedaj nihĉe posebej ni zanimal zanjo.

Vĉasih so se pojavile na ĉelu slikarja majhne gube, za trenutek je prenehal gledati plesalce in pogledal Mema v oĉi. V teh oĉeh je kakor da nekaj plamenelo, pogled je bil oster, zaradi ĉesar je Memo spustil svoje oĉi.

Zdelo se je, da je le gospa pozorno poslušala pripovedovanje. Veĉkrat je pokimala, medtem ko je Memo govoril o domnevni nevarnostih med voŝnjo, kakor da bi hotela pokazati za to zanimanje. Njeni ĉrni lasje so gosti, skrbno poĉesani in lepo urejeni. Ima trideset let, je srednje visoka, ni preobilna in tudi ne preveĉ tanka. Na gornjem delu njenega telesa je mogoĉe dobro opaziti, skladno z njeno telesno viŝino, dovolj visoke prsi. Njene ĉrne oĉi se vĉasih spogledujejo z Memom. Ta je verjetno opazil njene znake, saj so miŝice njegovega obraza vztrepitale ob vsakem sreĉanju njunih pogledov, na njegovih ustnicah pa se je pojavil nasmeŝek, ki bi ga bilo mogoĉe imeti za radostnega. Pozoren opazovalec bi opazil, da vendar ni ravnoduŝen do vseh ŝensk.

Ĉeprav se na ustnicah gospe Julke, od katerih je spodnja debeleŝa, tudi kaŝe nasmeŝek, je ta komaj

estas apenaŭ rimarkebla, ĉar ŝi pli lerte kaŝas siajn sentojn. Tamen Duulo bone rimarkis kio okazas en ŝia animo. Nur ne estis al li konate, kiam okazos la akcidento, pri kiu li estis certa ke ĝi okazos. Li tamen estis konvinkita, ke ĝi okazos jam post mallonga tempo.

Lin ne interesis la aŭtomobilo, tiom da fojoj de Memo priskribata kaj laŭdata, sed des pli grandan intereson li havis por diveni kio okazas en interno de la konatuloj. Li tiom sin okupis pri tio, ke li ne rimarkis ke pasis sufiĉe da tempo ĝis Memo ĉesis paroli, farinte per sia po ŝtuko la geston, kvazaŭ li volus forviŝi la ŝviton de sur sia vizaĝo. Duulo subbarbe ekridis, ĉar Memo, granda kontraŭulo de varmego, eĉ tiam kiam li tute ne ŝvitas, ŝajnis hipohondro al si konstante sugestanta la varmecon, provante la samajn sentojn altrudi al la aliaj.

“Vi sufiĉe staris,” kokete rimarkis al Duulo sinjorino Julinjo. “Vin doloros la kruroj.”

“Ne ĝenas. Miaj kruroj povas tion ĉi facile elteni. Kredu al mi, efektive mi tute forgesis ke mi staras, ĉar en tiel amuza societo, kia estas la nia, precipe proksime de belaj virinoj oni forgesas ĉiujn penojn.”

“Li mokas min,” ekpensis juna sinjorino kaj sur ŝia frunto li rimarkis kolersulketojn. Krome, ŝia mino tute serioziĝis kaj evidentigis la signojn de kolereco.

opazen, saj bolj spretno skriva svoja občutja. Vendar je Duulo dobro opazil, kaj se dogaja v njeni duŝi. Le da ni bilo znano, kdaj se bo zgodila nesreĉa, o kateri je bil prepriĉan, da se bo zgodila že v kratkem.

Ni ga zanimal avtomobil, tolukokrat ga je že Memo opisal in hvalil, toluko bolj ga je zanimalo, da bi ugotovil, kaj se dogaja v notranjosti znancev. Tako se je zaposloval s tem, da ni opazil, kako je minilo precej ĉasa, odkar je Memo prenehal govoriti in je naredil gesto, kakor bi si hotel obrisati znoj z obraza. Duulo pod drevesom se je zasmegal sam pri sebi, ker se je Memo, velik nasprotnik vroĉine, celo takrat, kadar se sploh ni potil, zdel kakor hipohondro, ki sam sebi nenehno sugerira vroĉino in poskuŝa enake občutke vsiliti drugim.

“Dovolj ste stali,” je Duula spogledljivo opozorila gospa Julka. “Noge vas bodo bolele.”

“Me ne moti. Moje noge to zlahka prenesejo. Verjemite mi, v resnici sem popolnoma pozabil, da stojim, ker v tako zabavni družbi, kakor je naŝa, zlasti v bliŝini lepih žensk, ĉlovek pozabi vse napore.”

“Norĉuje se iz mene,” je pomislila mlada gospa, in na njenem ĉelu je opazil gubice jeze. Poleg tega se je njen izraz povsem zresnil in pokazal znamenja jeze.